WIKIPEDIA

Altaja lingvo

Altaja (ojrota) lingvo (memnomo: *Altay til*) estas nord- aŭ sibirioturka lingvo, unu el tjurkaj lingvoj. Laŭ censo de 2002, nombro de parolantoj en Rusio estas 65534 personoj[1]. Plimulto el ili loĝas en Respubliko Altaj, kie altaja lingvo estas dua oficiala lingvo krom la rusa.

El inter la tjurkaj lingvoj la altaja plej proksimas al la kirgiza.

Enhavo

Klasado

Gramatikaj ecoj

Bibliografio

Notoj kaj referencoj

Eksteraj ligiloj

Klasado

Modernaj esploroj de Rusiaj tjurkologiistoj sugestas, ke altaja lingvo estas ne unu lingvo, sed almenaŭ du - la nordaltaja kaj la sudaltaja. Krome, multaj apartaj dialektoj de ili estas jam longe oficiale konsiderataj apartaj minoritataj lingvoj kaj ĝuas ioman protekton kiel endanĝeritaj. Pro tio oni proponas rigardi altajan lingvon kaj ĝiajn variantojn kiel tuta **Montar-Altaja lingvaro**, al kiu apartenas:

- Nordaltaja lingvo (ĉ. 10 mil parolantoj)
  - Kumanda lingvo
  - Ĉelkana lingvo (*kuu-lingvo*)
- Sudaltaja lingvo (ĉ. 50 mil parolantoj)
  - Tubalara dialekto - meza inter nord- kaj sudaltaja lingvoj
  - Vera altaja dialekto (*altaj kiĵi*) - bazo de literatura altaja lingvo
  - Teleuta lingvo
  - Telengita lingvo

Krome, lingvon tre proksiman al la altajaj uzas malgranda komunumo en Ĉinia Altajo apud lago Kanas. Ĝi estas plej proksima al la telengita dialekto.

Historie, altajaj lingvoj tenas grandajn similaĵojn kun la kirgiza, sed jam en Mezepoko la kirgiza malproksimiĝis de ili pro pli da kontaktoj kun kipĉakaj lingvoj.

La pozicio de altajaj lingvoj ene de la tjurka lingvaro estas iom neklara. Kiam oni konsideras ilin unu lingvo, oni apartenigis sudajn dialektojn al kipĉako-kirgiza sublingvaro, kaj la nordajn - aŭ al ujgura, aŭ al ĥakasa branĉo de eost-tjurka sublingvaro[2]. Sed pli modernaj skemoj pruvis, ke, unue, nordaltaja kaj sudaltaja estas evidente du malsamaj lingvoj, kaj due, ili apartenas al aparta subgrupo de ĥakaso-altaja grupo.

Gramatikaj ecoj

Gramatikaj karakterizaĵoj de altajaj lingvoj estas lipa vokala harmonio. Altajaj lingvoj havas plenan aron de afiksoj por ĉiuj vastaj vokaloj - do, ne nur por *a* aŭ *e*, kiel plimulto de tjurkaj lingvoj, sed ankaŭ por *o* kaj *ö* - ekzemple, pluralaj finaĵo estas, per cirilaj literoj, -лар/-лер/-лор/-лӧр. Nordaltaja lingvo konservas finaĵan *g* en plimulto da vortoj, kaj la sudaltaja perdas ĝin - ekz. vorto *monto* en nordaltaja estas «таг» ([*tag*]) kaj en la sudaltaja «туу» ([*tū*]). Ĉiuj altajaj lingvoj diferencigas longajn kaj mallongajn vokalojn. Ĉiuj komencaj konsonantoj krom *b* kaj *d/***g** estas senvoĉaj.

Bibliografio

- Дыренкова Н. П. Грамматика ойротского языка. М.—Л., 1940.
- Баскаков Н. А. Алтайский язык. М., 1958.
- Коргунбаева Н. И. Алтайско-русский — русско-алтайский словарь. Горно-Алтайск, 1991

Notoj kaj referencoj

1. ↑ Всероссийская перепись населения 2002 года. Том 13. «Коренные малочисленные народы Российской Федерации» (http://perepis2002.ru/index.html?id=44) ruse
2. ↑ Энциклопедия «Кругосвет» (http://www.krugosvet.ru/articles/80/1008043/1008043a1.htm) ruse

Eksteraj ligiloj

- Nordaltaja lingvo (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=atv) ĉe Ethnologue
- Sudaltaja lingvo (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=alt) ĉe Ethnologue
- Altaja alfabeto (http://www.tarbagan.net/fotj/AltaiLang.htm)
- Pagaro pri altajaj alfabetoj (http://www.writingsystems.net/languages/altaic/index.htm)
- Departamento pri altaja lingvo kaj literaturo (http://www.gasu.ru/univer/edu/dep/ff/alt.html) de Gorno-Altajska Ŝtata Universitato, Gorno-Altajsk, Rusio ruse

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Altaja_lingvo&oldid=6923396"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 16:09, 25 mar. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.